# LA TAŬRA VOĈO

**Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso**

**Sabaton, la 29an de Julio 2023** **Numero 1**

## Ek al la 108a Universala Kongreso!




Gazetara konferenco pri la UK
De maldekstre: Prof. Fabrizio Pennacchietti, prezidanto de la IKU, D.ino Michela Favaro, Vic-urbestrino, Giancarlo Cattai, ĉefraportanto pri la temo de la kongreso, Michela Lipari, prezidantino de LKK

## Kial la Taŭra Voĉo?

Ĉar la Taŭro estas la emblemo de Torino.
Malgraŭ la informoj kiujn vi trovos en Interreto, pri legendoj kaj historioj, la vera kialo pro kio Taŭro fariĝis emblemo de Torino apartenas al signara sistemo naskiĝinta en malfrumezepoko, inter kies meĥanismoj estas tiu de la t.n. "heraldiko parolanta", kiu similas al rebuso: por indiki personon aŭ komunumon oni povas elekti figuron kiu, laŭ sono, rememorigas la nomon: Aŭgusta Taŭrinorum -> Taurinus (en la itala Toro - Taŭro) -> Torino.
La unuan spuron de la Taŭro kiel emblemo oni trovas en la Statuto de la urbo en 1360. La bildo tiam estas tiu de Taŭro paŝanta. Nur poste ĝi fariĝos "furioza" (=baŭmanta). Kaj tia ankoraŭ estas prezentata en la nuntempaj emblemoj kaj oni povas vidi ĝin en ĉiuj anguloj de la urbo, kvankam de du jarcentoj flankiĝis al ĉi tiu simbolo alia pli monumenta: la Mole Antonelliana (=Kunstruaĵego Antonella - Projektita de arkitekto Alessandro Antonelli), emblemo de la UK.

## Cifereca kongresa libro

Krom la presitan, vi povas legi la Kongresan libron ĉe **uk.esperanto.net/2023/kongresalibro**

## Kelkaj utilaj frazoj

Saluton – Ciao [Ĉao]
Bonan matenon – Buon giorno [Bŭonĝorno]
Bonan vesperon – Buona sera [Bŭonasera]
Bonan nokton – Buona notte [Bŭonanotte]
Ĝis morgaŭ – A domani
Dankon – Grazie [Gracje]
Multan dankon – Mille grazie [Mille gracje]
Bonvolu / Mi petas – Per favore
Pardonon – Mi scusi [Mi skusi] (ankaŭ por voki kelneron kaj por enkonduki demandon aŭ peton)
Ĝis revido – Arrivederci [Arrivederĉi]
Jes – Sì
Ne – No
Bone – Bene
Malbone – Male
En ordo – Va bene
La ŝlosilo – La chiave [La kjave]
Mi nomiĝas… – Mi chiamo… [mi kjamo]
Mi ne parolas la italan – Non parlo italiano
Bonvolu paroli pli malrapide - Parli più [pju] lentamente, per favore
Mi komprenas – Capisco [Kapisko]
Mi ne komprenas – Non capisco [Non kapisko]
Mi ŝatas – Mi piace [Mi pjaĉe]
Mi ne ŝatas – Non mi piace [Non mi pjaĉe]
Kiel atingi la Politeknikon? - Come [Kome] posso arrivare al Politecnico [Polite'kniko]?
Kie estas la haltejo de la aŭtobuso? - Dov'è [Dove'] la fermata dell'autobus [a'ŭtobus]?
Mi volas… – Vorrei …
kafon – un caffè [un kaffe'] (oni servos al vi espreson)
teon – un tè [un te']
bieron – una birra
Kiom ĝi kostas? – Quanto costa? [Kŭanto kosta?]
Kie estas restoracio? – Dov'è un ristorante? [Dove' un ristorante?]
Mi estas vegetarano – Sono vegetariano [Sono veĝetarjano]
Mi estas vegano – Sono vegano [Sono vegano]
Hieraŭ – Ieri [Jeri]
Hodiaŭ – Oggi [Oĝi]
Morgaŭ – Domani
Malfermita – Aperto
Fermita – Chiuso [Kjuso]
Mi estas malsana – Sono malato

## KOMUNIKOJ

### Manĝoj

Eblas manĝi ĉe la universitata manĝejo. La elekto de manĝoj taŭgas por ĉiomanĝantoj, vegetaranoj, veganoj kaj personoj kun netoleremo al gluteno. La tagmanĝoj estas servataj de la 11h30 ĝis 14h30 kaj vespermanĝoj de la 19h00 ĝis la 20h00. La manĝejo troviĝas tuj apud la Kongresejo kaj Salono Zamenhof.
La manĝkuponojn eblos aĉeti en la Informejo de la Kongreso ĉiutage de la 9h00 ĝis la 11h00. Eblas mendi manĝojn jam ekde la unua sabato.
Por ricevi senglutenajn manĝojn bonvolu tion anonci kiam vi aĉetas la kuponojn.

### Prezoj

9 € (kompleta menuo)
Pastaĵo (supo aŭ rizo) kaj ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, panoj kaj trinkaĵoj.
Griza kupono
7 € (Menuo A)
Pastaĵo (supo aŭ rizo), legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Helblua kupono
8 € (Menuo B)
Ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Flava kupono
Eblas vidi la menuon de la tuta semajno apud la afiŝo ĉe la anonctabulo.

### Unuafojaj kongresanoj

Ĉu tiu ĉi estas via unua (aŭ dua, tria) Universala Kongreso? Ne maltrafu la programeron "Unuafojaj Kongresanoj" sabate la 29an je la 16h00 en la salono Pettyn!
Kiuj estas la celoj de la Universalaj Kongresoj? Kiel plene ĝui ilin? Kiel uzi la Kongresan Libron? Kio estas Movada Foiro, Nacia Vespero? Ĉu mi rajtas eniri en iun ajn salonon? Kio estas la Kongresa Kuriero? Dum tiu ĉi kunsido oni ricevos respondojn al la supraj demandoj kaj al aliaj faritaj de la publiko dum la renkontiĝo.

### La Kuriero de la Kongreso

La Kuriero de la Kongreso ĉi-jare estos la Taŭra Voĉo kaj ĝia redaktoro Pier Luigi Cinquantini KN255. La redakcio kolektas viajn kontribuojn ĉe la retadreso: **kuriero@esperanto.it**
aŭ pere de organizantoj ĉe la informejo aŭ persone. La redakciejo estas ĉe la Oficejo de LKK.
Viaj raportoj, anoncoj, fotoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj/senditaj al la redakcio plej malfrue je la 18a horo de la kuranta tago kaj kun ili estu ankaŭ indikita la Kongresa Numero kaj la nomo de la aŭtoro. Anticipan dankon por via kunlaboro.

## ANONCOJ

### Futbalemuloj serĉataj!

Ludantoj serĉataj! Dum la kongreso estas antaŭviditaj 2 trejnad-sesioj (31an de julio kaj 1an de aŭgusto), kaj la matĉo okazos la 3an de aŭgusto. La horaro estos ĉiam la sama: 17h00-18h30. Kunordigas la agadon Nicolas Aloisio, kontaktu lin kaj aliĝu al la Esperanta teamo!
**nicolasaloisio@gmail.com**

## UK KAJ INTERRETO

### Kongresa aplikaĵo

Ankaŭ ĉi-jare funkcias la Kongresa apo. Uzante ĝin, kongresanoj povas per sia poŝtelefono kaj komputilo konsulti la programon, marki siajn deziratajn programerojn, kontroli mapojn kaj gravajn anoncojn, vidi la liston de partoprenantoj kaj kun ili babili!
Vizitu ĝin ĉe **uk2023.esperanto.net**.
Por aliri necesas enmeti la retpoŝtadreson (kiun vi uzis en la aliĝilo por UK), al kiu estos sendata alirkodo – se ĝi ne alvenas en vian enirkeston, bv. kontroli ankaŭ vian spamujon.

### Konektiĝu kun aliaj kongresanoj

Aliĝu al la Telegram-grupo: **uk.telegramo.org** por babili kun aliaj kongresanoj antaŭ, dum, kaj post la kongreso!

### Promenadoj tra la urbo

Se vi emas promeni tra la urbo memstare, skanante ĉi tiun QR-kodon, vi povas elŝuti sondosieron entenantan gvidilon kaj relativan mapon, per kiuj vi povos libere viziti la urbon. Vi povas elekti inter 6 itinerojn.
Instrukcioj: Skanu la QR-kodon kaj kiam vi atingos **Bitoteko.it**, elektu unu el la itinerojn kaj alklaku ĝin: tie estos du dosieroj, unu aŭda kaj unu pdf'a elŝutu al via poŝtelefono kaj malfermu per via apo por aŭskulti sondosierojn kaj sekvu la itineron signita en la pdf-dosiero.
Kaze de malfacilaĵoj, petu helpon de volontuloj.